

AVENO #41 - Ekologio kaj Ekonomio
en la retejo: Januaro - Decembro 2015

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj".

La teksto estas lau la dato; bonvolu serchi temojn lau via intereso:

=====

...

2015-12-31 **aktuale prii Internaciaj Riveroj: Amur, Mekong, Brazilo**

Jen pluraj interesaj kaj pozitivaj novajhoj - ekzemple el la rusa oriento.

Nova naturprotekta regiono "malantau la Bajkal" - espereble ankau protektos la Amur kaj Shilka riveroj.

Se vi ne komprenas la anglan - vi certe komprenas la nomon de la riveroj - kaj povas klaki al la ligilo.

Tie vi trovos informojn ankau en aliaj lingvoj (Links sub "Documents").

Siberio: <http://org.salsalabs.com/dia/track.jsp?v=2&c=94n9a0nBA>

%2BRDzMIX8Kr2JUUYGTsmI9oB

Mekong: [http://org.salsalabs.com/dia/track.jsp?](http://org.salsalabs.com/dia/track.jsp?v=2&c=bymV1KaAzawxanA42CGWJUUYGTsmI9oB)

v=2&c=bymV1KaAzawxanA42CGWJUUYGTsmI9oB

Brazilo: <http://org.salsalabs.com/dia/track.jsp?v=2&c=ODQU>

%2FVv2d73mzJM9EzCZBEUYGTsmI9oB

ghenerale (cn, en, pt): internationalrivers.org

== =

2012-12-19 **Rezultoj de la Klimato Konferenco**

kelkaj samideanoj partoprenis la 21-an pintokonferencon pri la tutmonda klimato, COP 21 en Parizo.

Ilia raporto ankoraŭ mankas. Jen la retejo kun la proponita teksto de la presidanto, kiu estis akceptita,

sed devas esti ratifita de la unuopaj shtatoj. Tio estas facila tasko, char chiuj partoprenantoj konsentis.

Tamen, plenumi la la deciditajn pashojn, rimedojn kaj mezurojn (kiom da CO2,...) estas libervola afero.

La teksto estas en la 6 oficialaj lingvoj de UN:

[http://unfccc.int/documentation/documents/advanced_search/items/6911.php?](http://unfccc.int/documentation/documents/advanced_search/items/6911.php?preref=600008831)

preref=600008831

- - -

2015-11-26 **Gigantaj barlagoj detruas la klimaton - 10 argumentoj**

Bonvolu subteni la alvokon protekti la grandajn riverojn, ties vivejon kaj la klimaton.

Je la pagho vi trovos 10 argumentoj (lingvoj: cn, en, es, fr, pt) kial ili pli damaghas ol helpas.

<http://www.internationalrivers.org/node/9204>

www.internationalrivers.org/node/9204

- -

2015-12 **Grenlandaj glacheroj degelas pli rapide**

Tion mi vidis en iu raporto, kaj jam skribis pri tio en Augusto.

La raporto ankau montris la nigran tavoloeton sur la glacheroj, nomita Kryokonit (en: cryoconite)

Kriokonito estas kauxita de polvo kaj fulgo altransportita de la vento kiu restas sur la suprajho,
dum la negho au glacio evaporighas, la malhela substanco koncentrihas, kaj estas varmigataj de la sunbriloj.

Sekve de tio la degelado plirapidighas.

Oni trovas bonan artikolon en Esperanto pri glacheroj en eo.wikipedia.org , sed tie mankas la malhela kovrajho (Kriokonito).

= = =

2015-11-23 **El Ninjo & Arbaroj & Klimato & Vivantaro & Anthropoceno**

La chijara klimata situacio estas sub la agado de El Ninjo. Pluraj parametroj akumulighas:

la tutmonda plivarmigho, la detruado de pli kaj pli da praarbaroj (Brazilo ..., Indonezio, eble ankau en Siberio).

Mi lernis en arbaro-seminario pri Brazilo:

Ja, Brazilo estas pli ol nur Amazonio, sciencistoj montras 6 diversajn bio-regionojn kun evoluo:

(la nombroj: area parto je Brazilo, kaj rilate la regionon la perdita procentajo - por la naturo, protektita parto)

Pampa (2%, -70%, 3%) savanno > Eukalipto kaj agrikulturo

Mata Atlantico (13%, -92%, 2%) arbaro, Araukario > erozio, manko da trinkakvo por la metropoloj, rivero Sao Francisko sekighas

Pantanal (2%, -15%, 10%) iam la plej granda akvoza teritorio kun la rivero Paraguay (de la mondo) > malintensa bov-bredado, chasado

Cerrado (24%, -50%, 8%) savanno, acideta grundo, maldensa arbaro > sojfaba kaj sukerkana monokulturo, forstoj

Caatinga (10%, -50%, 1%) „blanka“ arbaro, char mankas humuso, mankas malalta verdajho > ligna karbo, akvumita agrikulturo (salighas)

Amazonio (50%, -17%, 25%) pluvarbaro kun giganta reto da riveroj, plej alta biodiverseco, hejmo de multaj indigenaj triboj

> gigantaj barlagoj je rivero por liveri kurenton al industrio (i.i. por aluminio): Xingu, Tapajos, ka., kiuj detruas lgrandskale a vivejon de homoj kaj bestoj.

La Amazonia Pluvarbaro estis kvazau ferma sistemo sub la suprajhoj (kronoj) de la arboj. La indighenoj ne ghenis tiun sistemon kaj ties buntega biodiverseco, sed vivis de la arbaro kaj kun ghi kiel hejmo. Ek de 30 jaroj la tegemento estas chifonita , kaj je la randoj tute forprenita. La laterit-grundo ne longe eltenas la radiadon de la suno kaj ighas stepo, parte agrikultura monokulturejo au bov-pashtejo. Indighenoj kaj originaj bestoj kaj plantoj ne plu povas vivi tie.

La homa aktiveco kauxas retrokuplighojn (kibernetika sistemo) - ekzemploj:

1. La para-nukso arbaro (brazila nukso) bezonas la Paguti (besteto kun fortaj dentoj) por dissemighi, kiu povas rompi la shelon de la nukso. La arbo estas protektita. Sed se la arbo staras meze en vasta monokultura kampo, la abeletej ne plu sukcesas alveni por polenado. Do, la arbo ne tooleras monokulturon.

2. Ech se oni prenas nur unuopaj (valoraj) arboj el la arbaro, la biodiverseca stabileco reduktighas / rompighas.

3. la t.n. Mato Paradigma: oni ne alportas grandan kontribuon al la NMP (nacia produktado) se oni nur rikoltas fruktojn, kauchukon en la arbaro. Do, pro tio la indighenoj ne ricevis la rajton je sia tereno. Tion nur ricevis setlantoj kiuj pretis forhaki la arbaron. (kaj parte vendis tiun rajton). Sed la monokulturoj (bovoj, sojo, sukerkano) ghenas la akvo-cirkuligon, sekva manko da pluvoo kaj da grundakvo. La forpelitaj indighenoj iras en la urbojn kaj ofte ighas drogo-maniuloj. Tio malstabilighas la socion. Mi audis de katolika grupo kiu rearbarigas terenon por redoni al Guarani-indighenojn hejmecan teritorion (en la suda Mato Grosso) por kultivi enkadre de arbaro kion ili bezonas. Sed la lobio de grandaj tereno-proprietuloj kontrauas perforte. La registaro devus protekti sed mem estas influita de la lobio & mafio.

4. Oni uzas la faligitajn arbojn nur parte (ch. Je 40%), la restajhoj estas forbruligita kaj tiel altigas la karbondioksido en la aero > plivarmigho; ankau multaj bestoj, insektoj

pereas en tiaj fajroj. Ekzistas pli bonaj metodoj por kulturaj specialajn arbo-tipojn, ol la „shtelado“ el la praarbaro.

5. Tutmonda efiko al la klimato: la grandskala detruo de (pluv)arbaro de tiom granda tereno sekvas al plivarmigo kaj hejtigas la efikon de El Ninjo, kies efiko ighas pli akre kaj damaghonte. Ni vidus en la sekvaj monatoj.

Bedaurinde la nuna registaro ne sufiche agadas. La vendado da resursoj ne estas limigita. Feliche la populacia kvanto ne plu kreskas tiom rapide.

(kolektita el diversaj prelegoj, pliaj informoj: <http://www.regenwald-institut.de>)

= =

2015-10-29 Glifosat damaghas ankau al lumbrikoj.

Pli kaj pli venas informoj ke Glifosat (vendita de Monsanto k.a. kiel „RoundUp“) trovas sian vojon ne nur en la ne-shatataj trudherboj (akompanantaj herboj), sed ankau en la homojn kaj aliajn bestojn. Ghi kausas kanceron, kaj pli rapide videbla: misformigojn che beboj en Argentino, kie ghi estas aplikata amase kaj shprucita per aviadiloj. Bedaurinde la industrio okupighis kashi la problemon kaj la oficialaj institutoj ne sufiche sekvas la problemon - estas pli facile transpreni la „esplorojn“ el la industriaj laboratorioj, kiuj ne vere reflektas la problemon, kion faris la oficialaj germanaj kaj EU-instancoj.

Nova esploro de grupo pri Grundo-Scienca Universitato en Vieno montris, ke ghi damaghas al lumbrikoj, se tiuj manghas la mortigitajn herbojn. Post 6 semajnoj la kvanto kaj aktiveco da lumbrikoj reduktighis je 60% !

(lau Martin Zaller et al., Institute of Zoology (Bodenkunde), University of Natural Resources and Life Sciences Vienna, Gregor Mendel Straße 33, A-1180 Wien, www.boku.ac.at)

= =

2015-10 Klimato - Grenlanda glachero degelas rapide.

La alteco de la sud-grenlanda glachero nuntempe degelas je 7 m jare !

Imagu, tuta Grenlando estas giganta insulo (preskau kontinento), kaj plejparte kovrita je glacio. Sur la glacio ofte nigra tavolo da fulgo - el niaj aŭtomobiloj, karbo-bruligejoj kaj pro la forbruligo de arbaroj. La fulgo kolektas la varmon de la suno, pro tio la degelado adicie - al la mezurebla plivarmigo - plirapidighas.

„Junularo por la Planedo“ estas CSO kiu batalas por la bontenado de la tutmonda klimato. 5 Junuloj el la diversaj kontinentoj vizitis grenlandon, kaj spertis la aferon. Vi povas legi - kaj rigardi la fotojn kaj filmeton - kion ili vidis tie propraokule, parolis kun la tieaj homoj, kaj instruite de specialisto, prof-o Jason Box, lernis pri la graveco de klimata stabileco.

La junuloj ech plantis 100 arbidojn en suda Grenlando, kie ili trovis interesan vegetaĵon:

1 plenkreskita arbo produktas sufiche da oksigeno por 2 homoj, kaj alprenas chiu jare ch. 10 kg da karbondioksido.

(ligilo dank' al Sonnenseite de Franz kaj Biggi Alt, ilia retejo en la angla:

www.youth4planet.org)

2015-09-14 Chu sekeco kausis la civitanan militon en Sirio ?

Inter 2007 kaj 2010 okazis grava sekeco en Sirio, kiu kausis altighon de la nutrajho-prezoj. Pli ol 1 miliono da homoj fughis al la urboj, char mankis la rikolto, kaj malsatmortis ilia brutaro. Evidente ne ekzistis daurigebla politiko pri agrikulturo. Oni tro-cherpis el la grund-akvo. Rivero Chabur, kiu alfluis al la granda Euphrat plene sekighis. Ankau poste la reghime ne sukcesis helpi la homojn. Tial la homoj ighis melkontentaj kun la reghimo de Assad.

(lau intervjuo 2015-09-14 de www.klimaretter.info kun profesoro Stefan Rahmstorf, www.Pik-potsdam.de)

--

2015-09-17 Atlantika Merkato kaj Investo Traktato (angle: TTIP) ighos pli neutrala: La disputoj jam solvendaj per ISDS (Investor-state dispute settlement), laŭ la propono de la Eŭropa Komisiono, nun devus esti solvotaj per "kortumo pri komercaj disputoj" konsistanta el triono da usonaj membroj, triono de Eŭropaj kaj triono de triaj landoj. Tial:

- la tribunaloj je una instanco konsistus el 15 juĝistoj: 5 Usonaj, 5 EUaj kaj 5 trialandaj;
- la apelaciaj tribunaloj konsistus el 6 juĝistoj: 2 Usonaj, 2 EUaj, kaj 2 trialandaj.
(dank al JoKo, <http://groups.google.com/group/EU-federo>)

= =

2015-09-10 Subtenu la rajton fondi sindikaton ankaŭ en Malajzio
La arbarekspluatisto, Sabah Forest Industries (SFI), posedata de Ballarpur Industries Limited (BILT), filio de la grupo Avantha, rifuzas agnoski la Regionan sindikaton reprezentantan siajn dungitojn (STIEU).

La pago en Esperanto: http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=2774

(dankon al Kurt Fischer)

- - komento: mi rimarkis ke ambau temoj tre rilatas ... mi esperas ke la sindikat(an)oj ne forhokus protektitan pluarbaron !?

2015-09-10 peticio favore al kuragha ĵurnalistino

Malajzio kontraŭas travideblon pri korupto kaj ne-protektion de la pluarbaro; preferas malliberigi la ĵurnalistinon Clare Rewcastle Brown.

Shi raportas pri ne-legha arbaro-forhakado, kaj pri la rilata korupcio.

Bonvolu subskribi peticion jen en 3 lingvoj – sur tiuj pagoj vi trovos ankaŭ la hispanan, portugalan kaj bahasa indonezia:

<https://www.sauvonslaforet.org/>

<https://www.rainforest-rescue.org/>

<https://www.regenwald.org/aktion/1015/malaysias-regierung-verfolgt-mutige-regenwald-kaempferin>

==

2015-08-19 Verdpaco protestas kontraŭ Shell

Shell ricevis la rajton ekspluati nafton kaj/au tergason en la Arkta Maro.

La naturprotektantoj timas, ke poluoj au ech katastrofo estus multe pli damaghata ol en la varma Meksika Golfo.

Krom tio malpli facile eblas help-agadi en kazo de katastrofo.

Malbona ekzemplo estas „nafta tapisho“ oriente antaŭ Grenlando, kaj ne eblas forŝuchi ĝin, pro la altaj ondoj.

(Iau Eva Oer, taz 2015-08-17, p. 9)

2015-08-18 Glacheroj en Centra Azio adiauas

Esploro de GFZ eltrovis ke la glachera amaso de la TienShan montaro reduktighis je 27% ene de la lastaj 50 jaroj.

Do, malgranda perdo dum longa tempo. Sed la perdo rapidighas. Kaj malpli da negho alvenas.

La chirkauaj landoj Uzbekio, Kazahio, Kirgizio, okcidenta Chinio nun havas pli da degelinta akvo, sed poste estos malpli.

(Iau Hannah Kappenberger, taz.de 2015-08-18, p. 8)

Komento AVE/mw:

Krom la altighanta temperaturo estas lla salo kiun transportas la vento de la (plejparte) sekighinta iama Aral-Mar.

Pri tio bonvolu vidi raporton je nia retejo:

<http://www.westermayer.de/manfred/verduloj/ara1.htm>

2015-08-24 Perm: en Rusio eblas detrui la klimaton kaj profitegi

Ege stulta krimo kontraŭ la tuta mondo.

Rusa firmao HaloPolymer intence elfumigis ab-gasojn (el produktado de plastajhoj) kaj tuj poste kaptis ilin pere de filtriloj. La gasoj estis (i.a.) HFC23 fluor-havaj hidro-karbono kaj SF6 (sulfur-heksafluorido). La malbona forzeja efiko de 1 kg da SF6 estas 22.800 foje pli forta ol 1 kg da CO2; tiu de HFC23 (formulo: CHF3) egalas al 11.900 foje CO2. Ili uzis ne-taŭgan regulon de la Internacia Klimato Protokolo (Joint Implementaion), laŭ kiu la kontrolon faris la koncernaj ŝtatoj. En Rusio tio estis German Gref, 2007 ministro pri ekonomio, kaj poste ĉefo de la Sberbank. Tiu banko elektis la projektojn kiuj devus helpi al la klimato.

Sed HaloPolymer misuzis la ideon, ŝanĝis la metodon, eligis multe pli da tiaj gasoj, „kaptis kaj detruis“ ilin - kaj ricevis amason da certifikatoj, kiujn ili vendis; ekvivalente al 600 milionoj tunoj da karboondioksido. Evidente la rusa aŭtoritato kashis tian agadon.

Mi ne trovis informon, ĉu ili sukcesis re-kapti la gasojn - kio estus simpla trompo, kiu ne ghenis la klimaton, au ĉu ili ne sukcesis re-kapti la gasojn.

Wikipedia Informo pri SF6 montras, ke la enhavo da SF6 en la tutmonda atmosfero duobliĝis inter 1998 - 2011 (de 4 al 7,5 ppt).

Eble pro tiom da ne-antaŭvidataj certifikatoj falis ilia prezo - tio kaŭzis, ke en Germanio eblas bruligi karbon por produkti elektron; ankaŭ malbona efiko al la klimato - kaj la koncernaj pejzaghoj, ekz-e-en Germanio pro la „bruna karbo“ (lignito).

Oni kalkulis, ke HaloPolymer kaj la kunuloj gajnis kelkajn cent milionojn USD inter 2009 kaj 2013; tiam Rusio forlasis la Kyoto-Protokolon - Kial ?

La sciencisto Lambert Schneider, de la Stokholm Environment Institute, postulas ke la reguloj laŭ la venonta Pariza Protokolo devas esti sub neutrala internacia kontrolo.

Jen pli detala raporto en la germana:

<http://www.tagesschau.de/wirtschaft/klimazertifikate-russland-101.html>

--

2015-08 Thule - Tuvalu - dokumentas la klimatan ŝanĝon, ege influantan la homojn.

Mi ĵus vidis la dokumentan filmon "Thule - Tuvalu" - kiu montras

unuflanke la homojn en tiuj tre disaj regionoj.

aliflanke la ne-pretervideblajn ŝanĝojn de ĉirkauaĵo pro la klimata ŝanĝo.

En Thule, origine "Qaanaaq", vi certe konas - la maraj ĉasistoj havas la problemon ke la glacio ne plu estas sufiĉe dika, kaj ne plu sufiĉe fore en la maro - kie ili ĉasas Narwal, ktp.

En Tuvalu, kie estas la maksimuma alteco 4m super la maro, kokos-palmoj falas en la maro ĉar la maro subfluas la radikojn, kaj ili ne plu povas kreskigi legomojn, ĉar la grundakvo iĝas pli kaj pli sala - kaj delonge ne pluvis - ili nun ricevas la akvon el foralando.

==

2015-08-24 Irano renovigas la regulojn por regajneblej energioj

Ghis nun la ekzistanta legho kaj reguloj ne sufiĉis por investi. Simple ne sufiĉis, kaj garantio por 5 jaroj estas tro mallonge, se oni investas kaj la repagodaŭro el tiu investo estas pli ol 10 jaroj. Nun oni ricevos dum 20 jaroj multe pli por elektro el fotovoltaiko (PV).

Samtempe la ŝtato subvencias la energiojn, kio unuflanke ne movigas homojn investi au uzi energion zorgeme, aliflanke la ŝtato ne plu havas monon por tiaj subvencioj.

Hans-Josef Fell, iama energi-specialisto de la Verda Partio en la germana parlamento, en Irano prelegis al respondeculoj kaj kunvenis kun la energi-ministro H. Chitchian kaj la estro de SANA (administrejo por regajneblaj energioj) Zadegzadeh por diskuti pri la eblecoj de kunlaboro kun germanaj esplor-institutoj, ekz-e ISE (Fraunhofer- Institut ...) en Frejburgo. Ankaŭ temas pri vento-energio.

Irano ja estas favorata de la suno. Sed tio ghenas la akvo-provizon; chi-rilate li instigis re-arbarigi por pli bonigi la regionan klimaton kaj ne perdi akvon. Uzi la kampojn ankaŭ por planti energio-plantojn donus la ŝancon, ke la kamparanoj povus resti en sia regiono - kaj ne estas devigataj eniri en la metropolojn.

Finfine tio donus socian stabilecon.

(en la germana kaj parte angla) <http://www.sonnenseite.com> > serchu Iran

Hans-Josef Fell kunfondis internacian energio-grupon (en la angla):

<http://energywatchgroup.org/>

2015-08-18 Islama Deklaro pri la Klimato

Simpozio en Istanbulo diskutis la anthropocenajn influojn al la klimato kaj menciis surojn kaj hadithojn rilate al la reponseco de homoj al la naturo. El tio venis sufiche ampleksa Islama Deklaro pri la Tutmonda Klimato-Shangho. Jen en la angla:

<http://islamicclimatedeclaration.org/islamic-declaration-on-global-climate-change/>

Bone - ni esperu, ke tio helpas la klimaton. Kunlaboris specialistoj el diversaj mondo-partoj kaj religioj, inter pluraj viroj kunlaboris tri virinoj (lau la retejo).

(trovita dank' al sonnenseite.com)

2015-09 UN decidas 17 celojn ghis la jaro 2030.

La konciza dokumento trovighas sur nia retejo: verduloj.org

(tradukitaj de Wolfgang)

==

2015-08-22 Peticio por defendi praarbarojn - flanke de UN

Jen peticio por defendi praarbarojn, ĉar che UN plantitaj arboj estas arbaro, dum ni scias, ke plantado de (ĉefe) palmarboj forigas la naturan arbaro kaj senigas homojn kaj bestojn de sia loghloko kaj medio

(dankon pro la informo al Renee Triolle)

(en pluraj lingvoj): <https://www.sauvonslaforet.org/>

Rimarko mw: Sur la retejo vi povas elekti vian lingvon, almenaŭ ankaŭ en la angla kaj germana la sama peticio ankaŭ troveblas;

simple iru al "Take Action" (angla) au "Aktiv werden" kaj vi trovos la bildon, kie arbaro aspektas kiel giganta greno-kampo.

Komento: La forto de unuopulo estas eta, sed kun multaj ni estas rimarkindaj - ĉu oni respektas la peticion, estas jam alia demando - ni ja estas esperantoj.

--

2015-08-19 Japanio: la unua reaktoro Sendai en Satsumasendai en la sudo, estis reaktivigita.

Evidente Japanio devis pagi iom por importi fuelon, sed jam forgesis la kostojn - kaj daŭrajn efikojn - de la Fukushima-atomkatastrofo.

Samtempe ankaŭ la vulkano Sakurajima, kiu trovighas en distanco de 50 km reaktivighis.

https://en.wikipedia.org/wiki/Sendai_Nuclear_Power_Plant

Ni vidos.

2015-08 Pli pri Fukushima en Esperanto

Ginette amendis la senditajn informojn:

www.satesperanto.org (la lasta traduko estas en aŭgusto 2013)

www.esperanto-indre.com (fidele enretigas la francan kaj la esperantan versiojn sed

kun malfruo. Rubriko Nouvelles du monde / Nouvelles du japon.

www.fukushima-blog.com (fidele enretigas cxiujn francajn tradukojn kaj foje enmetas la esperantan version fine de la franca versio) (la lasta dato estas la 25a de julio 2015) Jen la ret-adreso de samideano HORI Jasuo, kiu monate elsendas aktualaĵojn en Esperanto.

hori-zonto (che) water.sannet.ne.jp
Amike salutas, Ginette el Gerardmer

==

2015-08 Pliaj informoj pri Fukushima

Sur la pagharo de SAT aperis la taglibroj de HORI Jasuo ghis 2013 (en Esperanto).
<http://www.satesperanto.org/-Taglibro-de-nia-Kamarado-Yasuo-.html>

Kaj en la franclingva blogo kiun mi menciis estas la informoj de samideano HORI Jasuo, tradukitaj de Ginette (eblas uzi la tradukservon de tiu pagharo).

Shi rimarkis:

La blogo citita de vi estas la [tauxga](http://www.fukushima-blog.com) - kun multaj fotooj: www.fukushima-blog.com

Gxi estas farita de amiko Pierre Fetet kaj estas en la franca lingvo.

Li donas aktuale tre interesajn bildojn (vere vidindajn) pri la katastrofo kaj analizojn (en la franca lingvo). Tiu analizo aperos en la formo de pluraj sinsekvaj pecoj.

La artikoloj de Hori Jasuo aperas sur menuo destre iom sube, kaj de kelkaj monatoj la esperantaj versioj estas donataj cxe la fino de cxiuj francaj versioj.

Pierre Fetet fidele aperigas cxiujn artikolojn de Hori Jasuo tradukitajn de Paul Signoret kaj mi, alterne kun artikoloj kiuj venas al li el diversaj fontoj.

Amike salutas, Ginette

2015-08 Rusio - detruas nutrajhojn.

Malgrau la ne-suficha lau kvanto kaj kvalito prizorgo de la rusoj rilate nutrajhojn, la Putin-registaro decidis neniigi importitajn el okcidenta eksterlando nutrajhojn, i.i. laktoproduktojn.

La strukturo de la rusa agrikulturo estas sovhozaj konzernoj (lau grandeco) kaj memprizorgo. Mezgrandaj iniciativoj ne ricevas shtatan subtenon - male ili estas damaghataj flanke de la konzernoj, kaj ne ricevas kreditojn de la bankoj. La prezoj altighis.

Putin en sia decembra parolado celis uzi la embargon instigi la evoluon de la propra ekonomio; sed ghis nun mi (en la okcidento) ghis nun ne eksciis kiel tio okazigas.

La ekonomia produktado reduktighis en la dua kvaronjaro je 4% - pro ekologiaj kauzoj. Verduloj ghojas pri tio. Sed por la normalaj homoj en rusio chio ne plu estas „normala“.

(mi atendas artikolon el Rusio pri tio).

(lau Bad. Ztg. 2015-08-11, p. 15 kaj aliaj)

2015-07-31 Rusio vetoas esploron pri MH-17 / ektrovi falsajhoj / nederlanda raporto
Ghis nun mankas objektiva raporto pri la kauzo kaj kauso de la mort-pafita en la Ukraina chielo civila aviadilo MH-17, en kiu sidis 298 homoj. Rusio malpermesis UN-tribunalon por ektrovi la veron. Oni rajtas opinii, ke Rusio timas la (supozeble malagrablan) veron - chu ne ?

Sed ne chiu rusoj konsentas. Stopfake.org analizas (oficialigitajn) informoj kaj fotojn - kaj eltrovis ke pere de multaj falsaj kaj diversaj informoj la registaro klopodas vishi la objektivan bildon - same kiel fishisto, kiu mal-klarigas la akvon, por kapti ilin.

Ekzemple la oficiala rusa TV Perwy Kanal montris foton de ukraina aviadilo kiu lau tiu informo estus la pafinto - fakte ghi (la foto) estis produktita dank al Photoshop.

(

Tuj post la katastrofa pafo, kiu okazis 2014-07-17, Igor Girkin (tiam en la estraro de la separatistoj, kaj membro de la rusa militara sekreta servo) blogis sur V-Kontakt.. ke ili trafis ukrainan milit-aviadilon. Kiam montrighis ke temis pri civila Boeing li elvishis la blogon.

Kiam klaras kiu kauzis la mortpafon de 298 civiluloj, tiam venos granda fakturo de la asekuraj kompanioj de la familioj – kiuj venis plejparte el Nederlando.

Nederlando petis instali UN-tribunalon por oficiale kaj objekte eltrovi la veron – neniu kontrauis, krom Vitali Churkin, Rusio, kiu vetois.

Bedaurinde tiu ebleco de la UN-sekureco-konsilio estas ne-tauga, ofte ankau Usono au Chinio vetoas – por kashi la eltrovon de la vero.

Rusio siaflanke kvazau punis Nederlandon kaj malpermesis importon de floroj kaj plantoj el NL.

(lau Bad. Ztg. 2015-07-31, p.4)

2015-08-11 Japanio reaktivigas atomreaktoron en Sendai

Malgrau la protestoj de civitanoj – kaj proksima vulkano - la Abe-registaro decidis reaktivigi post 4 jaroj atomreaktoron.

2015-07-30 Fukushima blogo de HORI Jasuo kaj Ginette MARTIN

www.fukushima-blogo.de

==

2015-07-18 IAEA denove pri Fukushima

Nova temo estas la teknikaj problemoj de la koncerna reaktoro-tipo.

<https://www.iaea.org/newscenter/news/iaea-delivers-major-report-fukushima-accident-member-states>

(pri tiu raporto en la germana) <http://www.sonnenseite.com/de/zukunft/neuer-iaeo-bericht-zu-fukushima.html>

2015-07-18 Klimataj pintoj pli kaj pli

La glacheroj de Grenlando degelas pli rapide, la somera temperaturo estas multe pli alta.

<http://www.sonnenseite.com/de/umwelt/hitze-laesst-groenlands-gletscher-schmelzen.html>

kaj pri pli altaj temperaturoj en Europo ...

simile en la angla:

<http://www.sonnenseite.com/en/environment/the-current-heat-wave-a-climate-science-perspective.html>

==

2015-06-01 Agrikulturo kaj biodiverseco

Pli kaj pli grandighis la kampoj pro la uzado de multekostaj mashinoj, kiuj anstatauas la pli-multekostan homan laboron. Pro tio multaj sovaghaj herboj, insektoj kaj bestetoj reduktighis, ech je ekologiaj t.n. bio-bienoj. Iniciativo en nord-germana Meklenburgo, kie la kampoj estas grandegaj, instalis adaptitajn reguloj por naturprotektado je agrikulturo: malpli da fertiligenzoj, ne iom perfekte elradiki chiujn trudherbojn, lasi pli da ne uzataj zonoj.

(lau M. Kriener, taz 2015-06-01, p.09)

-

2015-06-30 Glifosat en la patrina lakto en Germanio

En Germanio oni uzas 6000 t de la totala herbicido „Roundup“ (glifosat).

La Verda Partio mendis esploron pri la disvastigo de tiu kemiaĵo en la patrina lakto.

16 specimenoj el diversaj regionoj montris, ke glifosat trovigas en la lakto, kaj ankaŭ en la urino.

Oni kritikis, ke la metodo ne estas evoluita por patrino lakto, sed nur por urino; do, tion devus financi la ŝtata san-ministerio. Medicinisto en Freiburg-a kliniko komentis, ke herbicidoj ne estu en la patrino lakto. Malgraŭ mankantaj pruvoj WHO (Monda San-Organizacio) supozas, ke glifosat estas kancerogena.

(laŭ K. Meyer, Bad.Ztg. 2015-06-27, p.11)

2015-06-23 Bubala Mozzarella havas kruelajn flanko-efikojn, similie je bovino lakto kaj ovo.

La fromaĝo de bubala lakto el norda Italio (Kampanjo) estas tre ŝatata, sed ne la viando de la viraj bubaloj. Pro tio oni mortigas la virajn bubalidojn amase.

Fakte simila afero estas je ĉiuj lakto-bestoj, sed kutime oni kultivas ankaŭ la virajn, por mangi la viandon.

Ankaŭ je la produktado de ovo en industriaj entreprenoj oni simple mortigas la virajn kokidojn (kokid-ich-ojn); sed nun oni reorientigas almenaŭ kultivi ilin kiel viando-liverantoj: necesis trovi specon kiu unuflanke ne donas tiom da ovo, sed aliflanke donas sufiĉe grandan kvanton da viando.

(pri bubaloj: laŭ Bad. Ztg. 2015-06-23, p.19)

(pri kokinoj: laŭ taz, 2015-06-27, p.04)

Komento (mw): Do, mangi malpli da bestaj produktoj (aŭ tute ne) reduktos tian mizeron.

==

2015-06-17 Papo Francisko publikigis sian enciklikon pri ekologio, klimato kaj sociala justeco

„Laudate si ...“ (same kiel en la Sun-kanto de la sankta Francisko) li postulis pli moderan vivstilon flanke de la riĉaj socioj, respekto kontraŭ la naturo „la gefrata vivantaj“.

2015-06-15 Francio malpermesas glifosaton (Glyphosat, t.n. „Roundup“ de Monsanto). Eble tiu malpermeso rilatas nur al ĝardenistoj, sed ne al la kamparanoj ?

Ĉiukaze, glifosato montrighis pli kaj pli danĝere, kiel ksenohormono kaj kancerogeno.

Ankaŭ la Monda Organizacio pri Sano (angle WHO), en Marto deklaris glifosaton „eble kancerogena“.

(laŭ AFP, en Bad. Ztg. 2015-06-15, p.19)

La permeso por glifosato en Germanio finiĝas 2015. Germana parlamentano de la Verduloj, Harald Ebner, postulis ne daŭrigi la permeson pro la kancerogeneca risko de glifosato.

(laŭ Jost Maurin, taz, 2015-06-11, p. 8)

Laŭ alia informo: kutime ĝi estas aplikata kune kun ia oleo, por pli facile eniri la ĉelojn; tielmaniere la risko ighas pli alta.

2015-06-13 Fishoj inĝigas pro HCB.

Esploristoj el Aŭstrio kaj Hispanio analizis la kvanton da HCB (heksa-kloro-benzeno) en alte situantaj lagoj (inter 1400 kaj 2700 m) en 9 lagoj en Pollando, Slovakio kaj Hispanio. Ili ankaŭ analizis junajn virajn trutojn en tiuj lagoj, kaj trovis ke ili inĝis. Do, tiaj pesticidoj movighas vapor-forme, kaj kondensighas en malvarmaj regionoj.

(laŭ dpa, Bad. Ztg. 2015-06-13, p.12)

==

2015-06-07 G7 strebas oligopolon, ankaŭ pri kamparoj kaj nutraĵoj la nuna G7 pintorenkontiĝo en Germanio (kostas iom pli ol 200 milionoj), ĉefe la

shtatestroj kaj diversaj ministroj diskutos pri klimato kaj TTIP.

Bedaurinde Rusio pere de (au pro) sia hibrida milito kontraŭ Ukrainio sin el-fermighis. Aliaj opinias, ke PR Chinio, Hindio kaj Brazilo apartenus al tiu grupo, dum Italio eble malpli.

Ech pli bone estus se EU havus komunan prezidenton, por anstataŭi la europajn shtatojn.

Alia demando estas ĉu la partoprenantoj devus reprezenti demokration - en diversaj formoj.

Putin ja partoprenis la G20 en Brisbane (ne-necese montrante sian militaran forton pere de militŝipoj kaj aviadiloj - laŭ informo de Rebecca Harms, parolantino de la Verduloj/Regionalistoj en la EP.

Jen kelkaj ligiloj al CSO-oj kiuj okupiĝas pri tutmonda nutrado kaj laborkondicoj, por eviti la plian disigon de la socio en malriĉula majoritato kaj ege riĉega minoritato. Ili ankau diskutas pri G7 kaj la klimato-shanghigho.

La organizajhoj parte apartenas al internaciaj retoj, kaj kutime havas butonojn por aliaj lingvoj.

(Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, ankau en Esperanto): globidar.org

(kristana, evangelia): brot-fuer-die-welt.de

(kristana, evangelia) pri justa evoluopolitiko): suedwind-institut.de

(kristana, katolika): misereor.de

(internacia, kontraŭ malsato): fian.org

(Informi kontraŭ malriĉeco,...): inkota.de

(evoluo): oxfam.de , oxfam.org

(tutmonda evolu-helpo): welthungerhilfe.de

===

2015-05 Klimato, El Ninjo, EU, fosiliaj fueloj

Jen interesa pagharo Respondo al Klimata Shanghigho, kie troveblas multaj detalaj artikoloj.

Politiko, chiutaga vivo, teknologio, industrio, agrikulturo

<http://www.rtcc.org/2015/05/14/european-commission-drops-demand-to-cut-fossil-fuel-subsidies/>

= = =

2015-04-25 Terura tertremo en Himalajo - Nepalo kaj chirkaue

Chi-taga sismego de la forto 8 kaj pluraj postaj kauzis grandareajn detruojn en Nepalo, Hindio kaj ankau Chinio. Samforta sismego en tiu regiono okazis 1934. Mortis pli ol 2000 homoj. Lavango detruis parton de la baza kampadejo je la monto Everest.

Ĉu la planataj grandaj barlagoj laulonge de la Tsangpo/Brahmaputra eltenus tiom fortan ter-tremon ?

2015-04-19 Chinio planas pliajn barlagojn en Tibeto

Hindio protestis kontraŭ la plano de 5 grandegaj barlagoj je la Tsangpo (Brahmaputra) en Tibeto. Unue ghi detruus la ekologion de la rivero, kaj due poste mankus la fekundaj grund-eroj kiuj fekundigas la agrikulturon en Assam ktp..

<http://www.sonnenseite.com/de/umwelt/chinas-ruecksichtslose-zerstoerung-des-oekosystems-in-tibet-beeintraechtigt-den-brahmaputra-in-indien.html>

2015-04-20 Sudafriko survoje al regajneblaj energioj:

Pasintsemajne, la sudafrika ministerino por energio anoncis ke la post sukcesa mendado kaj konstruado de 5400 MW da energiproduktado el renovigeblaj fontoj pere de la libera merkato inter 2012 kaj 2015, la registaro nun plue mendos ankoraŭ 6300

MW en la venontaj kvar jaroj. La projektoj jam konstruitaj, konstruataj kaj konstruotaj utiligas cxefe vento- kaj sunenergiojn, per grandaj instalajxoj de po 50 aux mem 100 MW.

El bone konektita fonto, mi eklernis ke la plej aktualaj prezoj por vent-energio estas 35-40% sub tiuj de karbon-brulado por elektro kaj la plej bonaj sunenergioprojektoj estas je la sama prezo de karbon-brulado. Samtempe, la du gigantaj novaj karboncentraloj de po 4800 MW kostos 50% pli ol « normalaj » prezoj de karbonbrulado, pro fuxado en sxtata monopol-entrepreno.

Finfine, la nova anonco por renovigeblaj energioj ankaux signifas, ke niaj politikistoj komprenis ke mendadao de atomcentraloj (ekz. el Rusio) estos tro multekosta kaj dauxros multe tro longe. Mi esperas, ke tiaj evoluoj signifas versxajn sukceson por la Pariza COP negocioj fine de la jaro. (de Harro von Blottnitz, Kap-urbo, SA)

2015-04-21 Serbia registaro en konstru-manio:

Mi remeoras la belan urbon Belgrad okaze de la SAT-kongreso 2006, kaj kelkajn jarojn pli poste je privata vojagho; la urba regiono lau la bordo de la Sava-rivero inkluzive de la kap-stacidometo montrighis en modesta kaj agrabla stilo. Sed chio funkciis bone. Lau la vizio de la shtatestro A. Vucic estos fino kun la modesteco.

Li ordonis rapid-planon „Beogrado je la Akvo“. Necesus detruiri chion en tiuj 177 hektaroj, konstrui en la futurisma stilo lau Dubai (au similaj ankorau-richuloj). Ghi apartenos al investora konstru-entrepreno Eagle Hills, Abu Dhabi. La plano bezonus i.a. novan fervojan ponton super la Danubo (kiu pagos tion ?), 40.000 da auto-parkejoj, 100 MW da kurento-provizo. La serba Arkitektura Akademio protestis, char tiu plano preferus privatajn interesojn antaŭ la publikajn. Krome AAS dubas pri la urbana kvalito kaj bezono de tiu projekto.

Sed la prezidento estas tiom konvinkita, ke li malebligis disdoni kritiko-informilojn. (lau A. Ivanji, taz.de, 2015-04-21, p. 6)

2015-04-19 franca estonta EPR atomreaktoro danghere:

En Flamanville oni trovis fendojn en la mantelo/shelo de la reaktora kaldrono. Esploroj finfine montris, ke la uzita shtalo estas ne-sufiche forta por elteni la altan premon – kaj havi adician sekurecon. Tio signifas ke eble chiuj da tia tipo estas malpli sekuraj (Olkiluoto, Flamanville, kaj Tajshan (P.R.Chinio). Ankaŭ pro aliaj problemoj prokrastighas la finkonstruado, kaj altighegas la kostoj.

(de): sonnenseite.com/de/energie/schwerer-schlag-fuer-frankreichs-atomindustrie.html

===

2015-04-10 Cezio-134, Cs-137 de Fukushima atingis Kanadon

4 jaroj post la japana atomkatastrofo oni mezuris tiujn radioaktivajn isotopojn, kiuj intertempe estis naghintaj de Japanio al Kanado, proksime de Vankuvero. Kvankam la koncentriteco estas ege malalta, tamen tiu elemento eniras la mar-estajhojn kaj trovighos en ilia viando.

(de): <http://www.tagesschau.de/ausland/fukushima-nordamerika-101.html>

Adicia informo chefe el Vikipedio:

Same kiel la radioaktiva pluvo post Chernobil, kiu transportis Cs-137, kiu elfalis en la nokto al la 1-a de Majo 1986 krom en regionoj de la tiama SU, ankaŭ en Austrio, la suda strio de Germanio, okcidenta Francio, k.a.. En suda Germanio ankaŭ en la jaro 2014 aproj kaj fungoj kaj kelkaj fishoj enhavis tro altan kvanton da Cs-137.

Duonighodaŭro de Cs-137 = 30 jaroj; de Cs-134 = 2 jaroj – ili elsendas elektronojn (beta-radiado), kaj rezultighas la elemento Bariumo.

===

2015-03-21 Monda Tago pri Akvo

La mondaj akvaj rezervaĵoj rapide mapliiĝas: post 15 jaroj la tero alfrontos mapliiĝon je 40% de la sensala akvo.

La alarmo, en la hodiaŭa monda tago de la akvo, estis lanĉita de la raporto "Akvo por daŭropova mondo" fare de UN.

Necesas do entuta reripensado: la konsumoj, ĉefe la terkulturaj kaj energiaj, estas ne elteneblaj kaj riskas plu soifigi la planedon. De nun al 2050:

- la akvopeto kreskos en la mondo je 55%;
- la terkulturado, kiu jam nun uzas 70% de la disponebla sensala akvo, devos liveri al la homaro aldonan 60% de manĝaĵoj. Tial necesos plibonigi la akvumajn teknikojn;
- la energiproduktado, kiu nun absorbas 15% de la akvodispono, absorbos 20% el ĝi en la venontaj 20 jaroj. Tial necesos pli efikaj malvarmigaj aparatoj kaj plia ekspluatado de le renovigeblaj energifontoj;
- ankaŭ en la manufaktura industrio kreskos la akvopeto: antaŭvideble je 400% kompare al 2000.

Komence de la tria jarmilo la mondaj ŝtatestroj, kunvenintaj ĉe UN, donis al si la ok "Jarmilaj Evoluigaj Celoj", realigendaj antaŭ 2015.

http://eo.wikipedia.org/wiki/Jarmilaj_Evoluigaj_Celoj

Nu, atinginte 2015, laŭ Monda Organizaĵo pri Sano kaj UNICEF, hodiaŭ en la mondo ankoraŭ:

- 783 milionoj el la homaro ne havas aliron al salubra trinkakvo (sufiĉe bonkvalita);
- 2,5 miliardoj el la homaro ne havas aliron al taugaj higien-necesejaj servoj;
- la malsanoj fontantaj el la uzo de polua akvo daŭre estas la ĉefa mortokaŭzo inter la geknaboj sub la kvinjara aĝo.

Restas krome grandegaj malegalecoj en la neevoluintaj landoj, tiel ke 90% de tiuj, kiuj loĝas en la kamparo, ne havas aliron al akvo.

J-K Rinaldo – jen la ret-ligoj al Europaj Federistoj:--

- por ĝin viziti - <http://groups.google.com/group/EU-federo>

--

2015-03-24 Fukushima: provizora vivo dum jam 4 jaroj

En la gubernioj Iŭate, Mijagi kaj Fukuŝima ankoraŭ nun multegaj homoj loĝas en provizora dometo. Riĉuloj povas konstruigi al si novan domon kaj bonŝanculoj povas translokiĝi al apartamento preparita por la suferantoj, male malriĉuloj havas neniun elekton krom daŭre loĝadi en provizora dometo. Ili nek havas monon por nova domo, nek havas monon por lupago de la apartamento. Dum ili loĝas en provizora dometo, ili ne bezonas pagi lupagon, sed tiuj dometoj estas tro malgrandaj, krome ili jam komencis difektiĝi

(el raporto de HORI Jasuo, 2015-03-24)

===

2015-03-11 Fukushima: 4 jaroj post la tertremego, csunamo kaj atomkatastrofo en Japanio

ankorau multaj homoj vivas en provizoraj loghejoj. Necesas stoki ancorau gigantajn amasojn da radioaktiva grundo. Radioaktiva akvo fluas en la oceanon. Almenaŭ la plej granda danĝero pro denova eksplodo de la fandighanta kerna amaso shajnas pasinteco.

Japanio multe streĉis por pli racie uzi elektran energion; tamen la registaro celas pli fortigi la industrian produktadon. Ili celas denove ekfunkciigi kelkajn atomreaktorojn, malgrau la permanenta forta sisma aktiveco en tiu regiono. Regajneblaj energioj jam multas, sed necesas importi fuelon.

--

2015-03-20 Dauripova agrikulturo en Brazilo – fakte en Bona Espero
Ek de aprilo ni havas agrikulturan projekton (2 jaroj) partnere kun la plej prestiĝa universitato en Brasilia (UNB) kiu al 50 junaj agrikulturistoj de la regiono instruas pri agroekologio, protekto de akvofontoj, nutra sekureco sen toksikaĵoj sed per alternativaj procedoj. La celo estas eviti la fuĝon el la kampoj de la juna generacio, kiu lasas la gepatrojn solaj kaj volas riĉiĝi en la faveloj de la grandurboj.

Tiuj temoj estos traktitaj teorie en la universitato, kiu konstruis specialan departemento en Alto Paraiso por preservi la biomon Cerrado (savano) la dua plej riĉa en Brazilo post Amazonio, kaj la praktikaj lecionoj okazos en nia bieno, kie la grundo estas ankoraŭ netuŝita de la homo, sen ia veneno. Niaj akvofontoj estas vera riĉeco same kiel etaj riveretoj sur nia grundo kaj originalaj arbaroj de la tipa savano. Ni ja disponas pri mil hektaroj, do dek kvadrataj kilometroj kaj tio estas ideala tereno. Dume ni organizas kursojn pri korekta nutrado, pri mediprotektado kaj seminarioj pri sano al la kampara loĝantaro. Kaj ne forgesu ke ni plantas niajn proprajn nutraĵojn (bananojn, mandiokon, kafon, sukeron, centoj da fruktoarboj abundas kaj evidente legomoj).

Amike, Ursula kaj Giuseppe

===

2015-03-03 Kial Kalifornio sekighas pli ol antaue
Lau Noah Diffenbough, profesoro pri Tero-sistemo en Stanford, temas adicie pri efiko de klimato-varmigho, ĉar je pli alta temperaturo ankaŭ pli da akvo vaporighas. 2014 estis la plej varma mezurita iam. Kalifornio ofte havas la problemon ke alta aer-premo evitas la alvenon de humideco el la Pacifiko. Sed la pli alta temperaturo pli-akrigas la problemon. Krome malpli neghas, sed pluvas – do, mankas la akvo-provizo de la Sierra Nevada. Eble jam oni rimarkas ke la klimato-katastrofo komencighas, sentebla en kelkaj lokoj.

(en la germana) http://www.deutschlandfunk.de/klimawandel-kaliforniens-anhaltende-duerre.676.de.html?dram:article_id=313197

===

2015 Gaviotas - pozitiva ekzemplo de evoluo kune kun la naturo
Mi ĵhus legis la raporto-libron „Gaviotas“ de Alan Weisman, (tradukita germanen (2012) el la angla). Gaviotas estis iu nefekunda loko meze en la orienta savanno (Ilanos) de Kolumbio. Kelkaj viziuloj alvenis tie 1962 kaj dank al homa inventemo kaj natur-amo ili sukcesis krei tie mirindajhon. Ech dum la hhaosa tempo en Kolumbio ili sukcesis de-teni sin de ia militado.

<http://www.friendsofgaviotas.org/>

<http://centrolasgaviotas.org> - kun detala paroloteksto de Paolo Lugari (lingvoj: es, en, de)

(la libro havas 374 paghoj (bele legeblaj) - la parolo nur 20 - leginda)

Chi-kaze mi rememoras la libron de André Cazesien „Urboj por shanghi la mondon“ - ne tiom ekologie, sed ankaŭ montras pozitivan efikon kiam civitanoj kunlaboras. (tradukita en Esperanton de M-Th. Lloancy, ISBN 978-2-35519-109-1, certe havebla dum la UK)

2015-02-05 Sao Fancisco - ne plu sufiche da akvo
al tiu grava rivero inter la sudo kaj nordo de Brazilo mankas la akvo. Fluetas nur. Entute 9 bar-digoj prenas la akvon por la urboj kaj malhelpas la grandajn fishojn nagh supren. Sed la manko da pluvo en Minas Gerais kie trovighas la fonto akrigas la problemon. La shtato volis fari grandan kanalon por provizi agrojn en la savanno, kiu elsuchus la riveron entute - se estus akvo.
En a metropolo Sao Paulo jam mankas akvo, kaj la prezo altighas.

http://www.deutschlandradiokultur.de/wasser-und-lebensader-sao-francisco-lieblingsfluss-der.979.de.html?dram:article_id=311136

Komento AVE/mw:

Chu tio estas sekvo de la senarbariga politiko de la lastaj jardekoj ?

Chu temas pri efiko de la El Ninjo/la Ninja vetero-periodajho ?

2015-02-06 Lando-forprenado subtenata de germana shtata banko DEG (Deutsche Investitions- und entwicklungsgesellschaft mbH) estas filialo de la germana KfW (Kreditanstalt fuer Wiederaufbau), kiu subtenas ekz-e la energio-shparadon en Germanio.

Sed DEG havas la taskon subteni privatajn entreprenojn en evoluolandoj. Bedaurinde ili ne subtenas etajn entreprenojn, sed postulas amplekson de projekto de minimume 3 milionoj - kaj do pruntedonas 1 milionon. Inter la subtenitaj firmaoj estas pluraj kiuj achetas grandegajn agro-areojn por kultivi ekz-e sojon au palmoleon. Bedaurinde ofte la shtato ne protektas la kamparanojn. Kelkaj ekzemploj:

1. Modibo Keita ricevis lue farmlandon je 27.000 hektaroj sen lupago de la shtato Mali proksime de la rivero Nighero. La sola kondicho estis doni laboron al lokaj homoj. Sed tiu areo parte estis uzita de kamparanoj de du vilaghoj. Keita malpermesis al la kamparanoj uzi la kampojn, detruis arbojn por havi pli grandajn agrojn, kaj mednis policon kaj soldatojn por terure forpeli la homojn.
2. Addax, firmao en Ghenevo, luis 57.000 hektarojn en Sierra Leone por 50 jaroj. Ili plantas sukero-kanon por produkti etanolo, kiu povas anstataui benzino. La firmao translokiĝis du vilaghojn (laudire kun 80 homoj), sed donis nur 2 rizo-kampojn al ili kiel kompenso, kaj pagas po 1 svisan frankon chiumonate al chiu homo. Tio ne sufichas por vivi. Addax ricevis krediton de 133 milionoj Euro - kie partoprenas ankaŭ DEG.
3. Corporacio Dinant achetis grandan areon en la regiono Bajo Aguan en Honduras dank al kredito je 75 milionoj usonaj dolaroj. La banko Ficohsa estis financita de la germana DEG kune kun nederlanda banko. Dinant plantis oleo-palmojn cele de produktado de bio-fuelo kaj perforte forpelis la kamparanojn. Human rights Watch raportis ke 92 kamparanoj estis murditaj.

DEG intertempe finis la kunlaboron kun Dinant pro la protestoj en Germanio.

4ff Simile oni menciis ankaŭ firmaojn en Paraguay kaj Sambia.

La CSO-oj (civil-sociaj organizajhoj) HRW.org kaj FIAN.org (agadas kontraŭ la malsato) protestis, kaj ankaŭ Uwe Kekertitz (Verdula parlamentano en Germanio), sed ne eblas diskuti kun DEG. Kekertitz okaze de kunsido de parlamenta komisiono demandis la reprezentaninon de DEG, chu ili ankaŭ subtenas malgrandajn entreprenojn - sekvas nula respondo.

Malgrau tio, ke la „patrino“ KfW estas shtata banko, oni traktas DEG kiel privata, kaj ne donas informojn. Bedaurinde tio (DEG) estas ne la sola malbona ekzemplo en la mondo. Multaj landoj akaperas agro-landon eksterlande por garantii al si profiton kaj provizon.

(Iau Ch. Jakob, taz 2015-02-06, p.5)

(en tre multaj lingvoj) www.HRW.org

(en, es, fr) www.FIAN.org

(eo) <http://www.globidar.org/globe/solidareco.htm>

===

2015-02 Austrio ne akceptas la kroman pagadon por Hinkley Point

Granda Britio mendis novan atomcentralon de EdF (Electricite de France). Ili ja rajtas ancorau. Sed por garantii la profiton ili petis de EU la akcepton de garantiita pago por chiu kilo-uatto dum ch. 30 jaroj. Fakte ni chiuuj kun-pagus, char tiu sumo (pli au malpli) mankus al la financoj de EU.

Austrio plendis oficiale kontraŭ tia subvenciado. Sed nun Britio ghenas al Austrio, repreni la plendon.

EWS-Schoenau, unu el la sendependaj civitanaj kurento-provizantoj en Germanio subtenas la agadon de Austrio. Kaj petas civitanajn subskribojn por subteni tiun la plendon de Austrio.

La paghara estas en la germana, kun tradukoj en la anglan kaj francan.

<https://www.ews-schoenau.de/kampagne>

Iam mi anoncis ke EWS lanchis kolekton da 100+x argumentoj kontraŭ la atomenergio, kiun ili metis sur sian pagharon - ankaŭ en Esperanto:

<http://100-gute-gruende.de/index.xhtml>

===

2015-02-01 Grekio komencas per nova politiko

La Greka registaro rifuzas la troan ŝparadon.

Ni esperas ke ili trovos la mankantan impostomonon por efektive renovigi la civitanan vivon.

Georgios Dimaras, de la Ekologia (Verda) partio Oikologioi Prasinoi, estis elektita en la regiono de Atheno.

En la nova registaro (Syriza - kooperativo da pluraj partioj) troviĝas la Maldekstra Ekologia Partio. En la Esperanto-Vikipedio ne troviĝas la aktualaj informoj.

https://en.wikipedia.org/wiki/Coalition_of_the_Radical_Left

<http://www.ecogreens-gr.org/cms/>

<http://europeangreens.eu/news/change-greece>

2014 Usona registaro uzas Esperanto - por klarigi la lernantoj la Akvo-Ciklon tradukita el la angla de Eduardo Trapani:

en Esperanto: <http://water.usgs.gov/edu/watercycle-kids-esperanto.html>

(dankon al Roland Schnell por la informo)

===

Bondeziroj, al chiuj por la Nova Jaro, amike Manfred

2014-12-28 Nafto-duko rompita - nafto poluas la Nigran Maron

15 km da bordo proksime de la urbo Tuapse estas poluitaj per la nafto.

Medioprotektantoj diras, ke la kvanto da nafto estas pli granda ol konsentite.

<http://www.sonnenseite.com/de/umwelt/oelunfall-am-schwarzen-meer.html>

2015-01-09 Turkio neglektas la testudojn

La civitanoj de Dalyan klopodas malhelpi, ke la firmao Dalcev, kies ĉefo estas membro de la reganta AKP, detruos la ovo-metejon de la testudoj, Caretta caretta.

Evidente la registaro ne tro interesigas pri la naturprotekto. Ĝis nun tiu loko estis protektita, kaj ankaŭ turistoj havis nur limigitan aliron, kiun mi mem spertis.

Se oni nun tie konstruos hotelon kun aŭ sen haveno, tiam tiu malgranda, trankvila, sabla loko estos malvalorigata aŭ tute detruata. La testudoj bezonas ĝin por meti siajn ovojn.

(laŭ J. Gottschlich, taz, 2015-01-09, p.13)

2015-01-09 Ni lasu la karbon en la tero por protekti la Teron:

Studajho de brita universitato pri kiel eviti la klimato-katastrofon rezultis en la jena konsilo:

Por ne superi la 2-grado-limon, kiu nuntempe estas akceptata, necesas lasi du-trionojn da fosiliaj (karbonhavaj) brulajhoj en la subgrundo.

La studajho elkalkulis, kiaj kushejoj en kiu regiono estas ekspluateblaj sub tiu limo-kondicho.

Aparte en la Arkto kaj la gudro-sablaj kushejoj devus resti ne-tushataj; kaj oni finu la

eksploatadi karbon.

Fakte ne temas pri protekti la Teron, sed zorgi ke la klimato sur nia planedo restu eltenebla por la homaj bezonoj.

(lau B. Poetter, taz 2015-01-09, p.12)